



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperantisto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 33-a jara n-ro 2

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

ESPERANTO EN LA MUELEJO DE METILERNANTOJ

La Muelejo de Piot, apud Châteauroux, estas la plej granda el ĉiuj „Muelejoj de Metilernantoj” (Moulins des Apprentis) troviĝantaj en Eŭropo kaj en Kameruno. Ĝi povas gastigi pli ol 150 volontulojn samtempe. Dum la somero de 1967 preskaŭ 400 gejunuloj el 14 eŭropaj kaj afrikaj landoj, sinsekve tie laboris.

Diferenco de nacieco alportas diferencon de lingvoj. Efektive, escepte de kelkaj gvidantoj kaj iuj volontuloj, la plimulto de la metilernantoj nur parolas sian naci-an lingvon. Kiel interkonatiĝi kun la juna germano kiu loĝas en la sama tendo, se oni, estante juna franca aŭ maroka metilernanto, nur komprenas la francan aŭ la araban lingvon?

La celo de la labortendaro estas ĝuste: interamikigi gejunulojn per reciproka kompreno. Tial necesis solvo. Jen kial Tonton, la fondinto-prezidanto de la Asocio, decidis ke oni proponu al la volontuloj kurson de Esperanto.

Tiel, tri kursoj sekvis unu la alian dum julio kaj aŭgusto, ĉiu dum proks. 12 tagoj. Kvindeko da volontuloj, francoj, germanoj, italoj, angloj, ĉeĥoj, jugoslavoj, marokanoj kaj senegalanoj partoprenis la kursojn. Du instruantoj, mem ankaŭ volontuloj, instruis dufoje ĉiutage, en la „Esperanto Pavilono”, de la 11-a ĝis la 13-a kaj de 17-a ĝis la 19-a horo. Komprenoble ili uzis la rektan metodon, pro la diverseco de lingvoj, kaj por agrabligi



(kliŝon afable pruntedonis U.E.A.)

la lecionojn. La metodo estis preparita aparte por ĉi tiu medio, jam dum multaj monatoj. Ĝi devus rezultigi parolkapablon sufiĉan por ebligi laboron en internaciaj ekipoj. Ludoj, kantoj kaj praktikaj ekzercoj havis gravan lokon en ĝi.

Efektive jam post du tagoj la lernantoj komencis uzi dum la laboro la elementajn esprimojn en Esperanto, kiujn ili lernis la antaŭan tagon. La bezono pri „esperantistaj laborekipoj” evidentiĝis. La metodo kaj la programo de la kurso estis

ASOCIAJ INFORMOJ

Kotizoj

Ankaŭ por 1968 la kotizoj estas:

sekcia membro	gld. 9,50
ĝenerala membro	gld. 10,—
samhejmano	gld. 4,—
junulo	gld. 5,50
abonanto N.E.	gld. 5,50
donacanto	gld. 1,— (minimume).

La ĝeneralajn membrojn kaj la abonantojn mi petas kiel eble plej baldaŭ pagi la kotizon resp. la abonprezon por la jaro 1968.

tiel kompilitaj, ke ĉiu leciono donis sci-ojn tuj utiligeblajn dum la laboro.

Kiam la kurso proksimiĝis la finon, oni povis vidi en tendaro gejunulojn de kvin naciecoj, kiuj kune formis laborekipon kaj ĝoje kriis inter si, petis helpon, kaj eĉ ŝercis . . . per Esperanto!

La sperto estis ĝojiga por ĉiuj: lernantoj kaj instruantoj. Lernantoj ekhavis la eblecon vere ekkontakti kun gejunuloj de aliaj nacieco kaj lingvo. La instruantoj, siaflanke, ekmiris pri la sukceso de siaj propraj lernantoj, kio pruvis ke la lingva problemo en tendaro de metilernantoj ne estas nesolvebla.

J.-M. Liouville.

Interesiĝantoj: Jam nun necesas prepari la kursojn de 1968. Se vi povas vivi en amika etoso, sed en primitivaj loĝkondiĉoj, se vi povas instrui, aŭ amuzi gejunulojn per gitaro, ludoj, kantoj, aŭ se vi ne jam povas tion sed volas lerni instruadon, se vi ne estas tro neĵuna (35 j.), se vi povas liberigi vin dum almenaŭ du semajnoj somere 1968, kaj finfine: se vi estas entuziasma pri ĉi tiu laboro - tiam ni volonte ricevos de vi poŝtkarton kun kelkaj indikoj pri aĝo, kapabloj, periodo, ktp. Ankaŭ provizoraj esprimoj de volo kaj preteco jam estas bonvenaj.

Skribu al:

**TUTMONDA ESPERANTISTA
JUNULARA ORGANIZO
NEJO-Komisiono.**

**Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z,
Nederlando.**

(Poŝtĝirkonto 3 45 63 nome de „Algem. Penningm. Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., Santpoort).

W. P. Lok-van Putten,
kasistino.

Ekzamenoj por la S-diplomo.

Je la 16-a de decembro 1967 okazis en Amsterdam ekzamenoj por la S-diplomo. Sukcesis 4 el la 7 kandidatoj, nome: F-ino M. Bokhorst, f-ino C. P. Westerveld, s-ro R. Moerbeek (ano de LEEN) kaj s-ro J. Calado (ano de L.E.E.N.).

MABESOONE-FONDAĴO.

La enspezoj por la fondaĵo en 1967 estis jenaj:

K. B. en Gr.	f	2,50
D. K. en Gr.	„	2,50
J. P. H. en H.	„	15,—
J. F. P. en V.	„	10,—
H. K. en 's-Gr.	„	25,—
Sekcio L.E.E.N., Hilversum	„	25,—
Sekcio L.E.E.N., Amersfoort	„	5,—
P. B. en R.	„	3,—
S. A. K. v.d. Z. en L.	„	5,—
J. v. H. en Gr.	„	5,—
R. M. en E.	„	100,—
Sekcio L.E.E.N., Alkmaar	„	14,—
W. V. v. Th. en A.	„	15,—
R. S. en Z.	„	25,—
N. N. en G.	„	25,—
P. H. S. en Gr.	„	5,—
G. W. en Gr.	„	2,50
Sekcio L.E.E.N., Haarlem	„	53,—
Merkurio, Rotterdam	„	6,—
J. P. en G.	„	2,50

Entute \sum f 346,—

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Mi esperas, ke en 1968 multaj personoj sekvos la bonan ekzemplon.

J. E. Prins,
Hora Siccamasingel 294, Groningen.
Kasistino Mabesoone-Fondaĵo,
Ĝirkonto: 81 58 89.

Ĉefestrarelektoj

S-ro B. R. Beekhuijsen, ĉefestrarano, ne estas reelektebla.

Artikolo de s-ro G. J. Degenkamp

Ĝus antaŭ la publikigo de la decido de la ĉefestraro ne plu aperigi artikolojn pri-traktantaj la ata/ita-aferon, la redakto-

EL LA SEKCIOJ

Sekcio Haarlem „Komprenado Faras Pacon”

Sekr.: Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout.

Invito

La Haarlema Esperanto Asocio „Komprenado Faras Pacon” invitas klubanojn de aliaj sekcioj partopreni la ĉiujaran „virinan vesperon”. Tiu vespero estas distra vespero kun multaj regalajoj kaj tre varia programo, tute kompilita kaj prizorgita de la virinoj de la klubo.

Ni volonte ricevos sciigon *kiom* da personoj el ĉiu sekcio intencas veni pro kvanto de la regalajoj. La kunveno estas en Wilhelminastraat 22, Haarlem, atingebla per buslinio 3, ek de la stacidomo. Komenciĝo je la oka h. La dato de la vespero estas *la 19-a de marto*.

Zamenhofvespero

Je la 14-a de decembro okazis nia Zamenhofvespero. S-ro Jaumotte el Belgujo parolis por ni pri la pozicio de Esperanto en la mondo. S-ino Koopmans kaj s-ino Schoonman kantis kaj akompanis. S-ro Janssen, prezidanto de la komitato, malfermis la kunvenon kaj parolis kelkajn memorajn vortojn pri D-ro Zamenhof.

Post kantado de s-ino Koopmans, s-ro Jaumotte faris sian paroladon: Zamenhoftago estas en la tuta mondo memortago. Iu sinjoro skribis en revuo, ke oni ne bezonas esti klubano por esti Esperantisto. S-ro Jaumotte naŭzas pri tia

ro ricevis finan artikolon pri tiu ĉi temo de s-ro Degenkamp.

Ĉar s-ro Degenkamp verkis la artikolon antaŭ ol li povis scii la decidon de la ĉefestraro, kaj krome tiu ĉi artikolo estas ankaŭ por la verkinto finkonkluda, ni decidis presigi ĝin en ĉi tiu numero. Bedaŭrinde ĝi pro manko de loko ne povis aperi en la januara numero.

Ĝi estas vere la lasta pri ata/ita.

La artikolo estas presita sur p. 17/18.

Sekcio Rotterdam/P.T.T.-La Espero

S-ro M. J. Driessen eksiĝas kiel sekretario.

Ekde 1-1-1968 transprenis la sekretariecon s-ino P. E. van der Werff-Geldmaker, Statenweg 168a, Rotterdam-4.

Tel. 0 10 - 28 06 42.

elparolo: sen organizo ne estas okazo lerni Esperanton, ne estus kursoj, ne estus okazo eldoni novajn librojn, k.t.p. Tiaj homoj kontraŭlaboras Esperanton. En la lasta kongreso parolis prof. Lapenna kelkajn horojn kaj li nur laŭtlegis el diversaj Esperanto-revuoj en kiuj oni skribis kontraŭ Esperanto!

Oni diras, ke Esperanto stagnas, sed neniam antaŭe estis tiel multe da personoj en la mondo, kiuj parolas nian lingvon. Antaŭ 50 jaroj ne estis unu Esperantisto en Japanujo kaj nun estas miloj!

Plue s-ro Jaumotte rakontis pri kelkaj spertoj de li mem kiel ĵurnalisto. Kial oni trovas tiel malmulte da intereso por Esperanto en la ĵurnaloj? La kaŭzo estas laŭ s-ro Jaumotte, ke Esperanto jam ekzistas longe, tio ne plu estas novaĵo. Li rakontis pri sonbendgvidado en muzeo; estis bendoj en angla, franca kaj germana lingvoj, la Esperanto-unuiĝo donacis bendon en Esperanto. La aliaj bendoj estis luataj multfoje, la Esperanto-bendo nur unufoje kaj de la sekretario de la klubo. La sama okazis pri la biblioteko en Antwerpen. Neniu pruntis Esperanto-librojn. Kiam oni volas havi sukceson, oni devas montri intereson.

S-ro Jaumotte donis ankoraŭ aliajn ekzemplojn kaj finis la paroladon per laŭtlegado de la parolado de d-ro Zamenhof en la unua kongreso en Boulogne-sur Mer.

En la paŭzo ni povis aĉeti librojn, diskojn k.t.p. Post la paŭzo s-ro Jaumotte respondis kelkajn demandojn. La salono estis sufiĉe plena, sed fakte ĝi devus esti tro malgranda!

G. J. R.-B.

Frisa Esperantista Rondo

Sekr.: Goutumerdijk 18, Leeuwarden.

Kiel kutime Groningenanoj kaj Frisaj Rondanoj kune festis Zamenhoftagon, ĉifoje en Leeuwarden. La loko de kunveno estis Hotelo de Klanderij, por la okazo feste ornamita per flagoj kaj flo-roj.

Post enkonduko de la prezidantino, rilatante al la ĵus publikigitaj leteroj de Zamenhof al Paul Nylén, el kiuj tiel klare prezentiĝas la t.n. malgrandaj zorgoj kiujn Zamenhof havis apud sia kreinta laboro kaj kiuj nepre devas konsoli la nuntempajn laborantajn Esperantistojn, okazis komuna kantado sub gvido de la

kantisto Arjen Zondervan kaj kun akompano de f-ino M. K. Zondervan.

Tre interesa punkto de la programo - Zamenhoftago estas ja librotago - estis la literatura kvizo, lerte kompilita kaj prezentita de s-ino D. de Vries-Suwijn kaj s-ro Tj. Boersma. La demandoj pri verkistoj kaj verkoj, la memorado de entekste uzitaj proverboj kaj la rekono de prelegitaj libropartoj postulis sufiĉe da pensgimnastiko de la publiko!

Groningen kaj Leeuwarden rikoltis saman kvanton da poentoj kaj Leeuwarden „grandanime” transdonis sian parton de la premio al la gastoj.

Post la paŭzo, kiun oni elprofitis por bablido kaj subskribado de diversaj leterkartoj al malsanaj aŭ izolitaj samideanoj en- kaj eksterlande, Leeuwardena popoldancgrupo, gvidata de s-ino Dauvillier-Hulstkamp, zorgis por la gajeco de la vespero.

Sekcio Zaandam

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Lundvesperon la 12an de februaro okazos nia Jarkunveno en Doopgez. Weeshuis, Stationsstraat 6, Zaandam je la oka horo. Krom la kutimaj raportoj ni post la paŭzo intencas prezenti gravan proponon por la somera propagando.

Sekcio „Unueco”, Krommenie

Sekr.: Popelstraat 13.

Ĵaŭdon, la 14-an de decembro pasinta, Zaanlanda Esperanto-Komitato aranĝis agrablan vesperon.

En la granda salono de R.-K. Unuiĝa Konstruaĵo „Trouw moet blijken” kolektiĝis kontentiga aro da Esperantistoj por komune memori la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof.

La prezidanto de „Unueco”, s-ro Hogenkamp, bonvenigis la ĉeestantojn.

La muziko de la junaj muzikantoj sub gvido de s-ro Jagtman estis bonega. La prezidanto rakontis ion pri d-ro Zamenhof.

Bedaŭrinde nia parolanto por la vespero ege malfruigis. Pro tio rapide li legis pri: „Ni uzu taŭgan sloganon!”

La esenco de liaj vortoj estis, ke la praktika uzo de Esperanto estas la plej bela omaĝo al ĝia kreinto.

Entute sukcesplena vespero, pro kio ni dankas kaj gratulas Z.E.K.

Intervjuo pri Esperanto

La 11-an de januaro okazis intervjuo pri Esperanto antaŭ la mikrofono de K.R.O. Ĝi estis en la kadro de la konata programo „La volo de la patrino estas leĝo”, kaj speciale en la ĵaŭdo-elsendo ĝi nomiĝas „La mondo ĉirkaŭ vi”.

F-ino Mia Smelt bonege enkondukis la temon. F-ino Dores Witte intervjuis laŭvice s-ron Hans Bakker, Benata kaj s-inon Koopmans. Meze en la elsendo oni aŭdigis pecon de la kanto „La preĝo sub la verda standardo”, muziko de s-ro Dirk Schipper.

S-ro Bakker prilumis la praktikan flankon de Esperanto, s-ino Koopmans estis intervjuata pri la idealista flanko kaj muziko kaj religio. Beata devis respondi al demandoj pri ekzamenoj kaj pri siaj spertoj en Esperantujo.

La elsendo finiĝis per kanto de Ramona van Dalsem: „La eta konkuranto”.

Esperanto-klubo en Nijmegen

Ni ricevis bonaspektan presitan (!) programon de la Esperanto-klubo „Zamenhof” en Nijmegen.

La sendependa klubo jam ekzistas ekde 1961 kaj laŭ iniciato de ges-roj Wulfers formiĝis el personoj, kiuj partoprenis gazetkurson.

Oni regule kunvenas en la hejmo de ges-roj Wulfers, Lindanusstraat 16, Nijmegen.

Skoltismo

Volonte ni ankoraŭfoje atentigas al: LA SKOLTA MONDO, oficiala organo de la Skolta Esperantista Ligo. Reprezentanto por Nederlando estas s-ro J. K. Hammer, Taxusstraat 7, ZAANDAM.

KORESPONDPETOJ

F-ino Purificación Martin Albert dez. kor. kun juna fraŭl(in)o pri temoj kiuj estas interesaj por ĝejnuloj. Adreso: C/Turia 38-8 VALENCIA 8, Hispanujo.

Jaroslav Šmejkal, Sokolovská 899/234, PRAHA 8, Ĉeĥoslovakujo, dez. kor.

53-j., S-RO NIELS JUHL, Storegade 18, Outrup, Danl., dez. kor.

Interesiĝas pri ĉiutaga vivo.

53-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Sub la Alta Protektado de Ĉef-Generalo Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

N. 5. Rotterdam, la 11-an de jan. 1968.

Dua Bulteno. En februaro estas sendita al ĉiu alinĝinto la Dua Bulteno. En ĝi troviĝas, krom ĝeneralaj informoj, indikoj kaj mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo. Infana Kongreseto k.t.p.

Oratora Konkurso. La temoj ĉijaraj estas jenaj:

- Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj (Art. 1 - Un. Dekl. Homaj Rajtoj);
- Egaleco de seksoj en la Un. Dekl. de Homaj Rajtoj;
- La fenomeno de „Florinfanoj”. Alia temo decidota.

Ekskursoj. Okazos tri samtempaj tuttagaj ekskursoj al Toledo, Segovia kaj „El Escorial”. Detaloj en la Dua Bulteno.

Ĝeneralaj Kunvenoj. Dum la Kongreso okazos du ĝen. Kunv. de UEA, el kiuj unu havas kiel temon: „Kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio laŭ la Un. Dekl. de Homaj Rajtoj”.

Aliĝis ĝis 10-1-1968 entute 646 personoj el 32 landoj.

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario

Oficialaj Observantoj ĉe la 11-a Infana Kongreseto

La Ĝenerala Direktoro de la Infana Instruado en Hispanujo, s-ro D. Joaquín Tena Artigas, sciigis al la Hispana Esperanto-Instituto, ke li sendos Oficialajn Observantojn al la 11-a Infana Kongreseto de Esperanto, kiu okazos en la kadro de la 53-a Universala Kongreso, okazonta de 3-10 aŭg. 1968 en Madrid.

INTERNACIAJ KULTURAJ FERIOJ EN JUGOSLAVIO

Dum la somero 1968 okazos en Jugoslavio tuta sinsekvo de esperantistaj feriaranĝoj sub la nomo „Internaciaj kulturaj ferioj”. Tiaj aranĝoj jam estas akceptitaj de la Turismaj societoj en Bled, Dubrovnik, Poreč, Zabljak kaj Rovinj. Ĉiu aranĝo daŭros 15 tagojn kaj kune ĉiuj aranĝoj donos la eblecon ferii en unu el la plej allogaj turismaj lokoj de Jugoslavio, kiam ajn inter la 1-a de junio kaj la 30-a de septembro. La programabono por unu aranĝo estos 8 usonaj dolaroj. Por komencantoj okazos unuagradaj kursoj.

Kompletigajn informojn donas: pri la programoj la Turisma sekcio de IOE por Jugoslavio, SEK, p.f. 213, ZAGREB, Jugoslavio; pri restado kaj turisma dokumentado la koncarnaj Turistoficejoj (Turistiĉko društvo) en Bled, Dubrovnik, Poreč, Zabljak kaj Rovinj.

Renkontiĝo Astronomoj - Amatoroj

Popola Astronomia Observatorio de la urbo Zilina (Ĉeĥoslovakujo) preparas internacian renkontiĝon de astronomoj en aŭgusto 1968. Samtempe okazos ekspozicio de poŝtmarkoj kun temo „Kosmo”. Oni estas petata jam nun anonci sin por ke la aranĝantoj de la renkontiĝo sciu la nombron de partoprenantoj. Kiel adreso sufiĉas: Popola Astronomia Observatorio, ZILINA, Ĉeĥoslovakujo.

Kultura festivalo en OPAVA

La 7—10.7.1967 okazinta „Esperantista kultura festivalo - OPAVA 1967” estis granda sukceso. Partoprenis entute 330 personoj el 37 landoj. Ĉiu partopreninto ricevis specialan festivalan broŝuron kun kultura enhavo, i.a. artikolo de prof. V. Ficek pri la „Sileziaj Kantoj” de la ĉeĥa poeto Petr Bezruč, kies 100-jaran datrevenon oni rememoris.

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

Reprezentanto por Nederlando de „Heroldo de Esperanto” kaj „Norda Prismo”

Eŭropa Federalismo kaj Esperanto

La Federacia Internaciumo (Föderalistische Internationale) FI kaj ĝiaj suborganizoj, la Eŭropaj Federaciaj Partioj EFP, nun diskutadas la lingvan problemon en Eŭropo kaj tiurilate la „por” kaj „kontraŭ” de Esperanto, kiel eŭropa helplingvo (ankaŭ por la interna uzo en la partio mem). La celo de tiuj diskutoj estas la enmeto de la lingva problemo kaj ĝia solvo, kiel firma programpunkto en la Eŭropa Bazprogramo de la FI. Per sia vere eŭropa konstruo kaj sia moderna programo la Eŭropaj Partioj (kun la tegmentorganizo FI) prezentas ion novan kaj montras al ni, Eŭropanoj, la sole eblan alternativon.

Eŭropaj Partioj nun jam ekzistas en Aŭstrujo, Okc. Germanujo kaj Svedujo. EFP-fondkomitatoj ekzistas en multaj aliaj eŭropaj landoj.

La Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo ne jam realiĝis, sed ili ankaŭ ne estas utopio aŭ iluzio.

Helpi efektiviĝi ilin estas tasko por ĈIU. Ni urĝe alvokas la amikojn de la Internacia Lingvo Esperanto.

- subtenu tiujn-ĉi Eŭropajn Partiojn minimume en ilia klopodo oficialigi Esperanton en Eŭropo!
- petu pliajn informojn pri programo, organizo ktp.!
- skribu amase leterojn, per kiuj vi rekomendas kaj subtenas la oficialigon de Esperanto en Eŭropo, por influu pozitive la nunajn interne de la partiorganizo okazantajn diskutojn!
- direktu viajn demandojn, leterojn ktp nacilingve aŭ en la Internacia Lingvo al jenaj adresoj:

Aŭstrujo - Föderalistische Internationale, Wien 19, Osterleitengasse 7.

Okc. Germanujo - EFP Generalsekretariat, 28 Bremen 1, Contrescarpe 123.

Svedujo - EURO-SKANDINAV, Täby/Stockholm, Skolvägen 7.

Nederlando - FI Agadkomitato, Schoorl NH, Talingstr. 8.

FI-Agadkomitato por Nederlando.

Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.

La Redaktoro.

TRA LA LIBRARO

PRECIS D'INTERLINGUISTIQUE GENERALE ET SPECIALE de M. Monnerot-Dumaine. Paris 1960, 210 p. Prezo: gld. 20,10.

Tiu ĉi libro plenumas jam delonge sentatan bezonon je sufiĉe detala libro pri la planlingvoj aperintaj post „Historio de la mondolingvo” de Drezén. Sed ankaŭ pri la pli malnovaj planlingvoj ĝi donas multon novan.

La libro impresas malpli peza ol Drezén. Ĉe Drezén oni vadas tra listoj da projektoj, plejparte ne enhavantaj multon valoran aŭ originalan. Ankaŭ lia ordigo ĉefe kronologia malhelpas la supervidon pri la simileco de projektoj. Monnerot-Dumaine unue pritraktas la ĉefajn problemojn kaj proponitajn solvojn en la planlingvokonstruado kaj nur poste la ĉefajn unuopajn projektojn, ordigitajn en rubrikojn laŭ kreskanta naturalismo. Tiel li pli reliefigas la similecon inter projektoj tempe malproksimaj, ekz.

Esperanto kaj Pantos Dimou Glossa (1858: skema derivado kaj karakteraj finaĵoj por la vortspecoj). La malpli gravajn li nur skizas en alfabeto listo, tiel kombinante legeblecon kaj completecon. Granda merito estas ankaŭ lia senpartieco. Monnerot-Dumaine donas la plej gravajn argumentojn de la ĉefaj interlingvistikaj skoloj.

Li ne apartenas al la Esperantomovado. Li anas la skemismon, Zamenhofon tre admiras, sed Idon taksas pli alte.

En la libro troviĝas nur kelkaj detaleroj, ekz. „filion” anstataŭ „filon” (p. 54) „sz”, „kz” anstataŭ „sc”, „kĉ” (p. 103), la pure greklatinida vortaro de la naturalismaj planlingvoj (p. 113), dum Occidental havas ĝermanajn radikojn. Kun lia defendo de la precizema derivsistemo de Ido mi ne konsentas. Sed la esperantistoj ne estas infanoj, timeme protektendaj kontraŭ ĉiuj danĝeraj influoj. Tial al ĉiuj esperantistoj, kiuj volas profunde orientiĝi pri aliaj planlingvoj, mi ĝin varme rekomendas!

D-ro W. A. Verloren van Themaat.

FAJRO SUR MIA LANGO, poemkolekto originale verkita en esperanto de Edwin de Kock. Prologo de Balduw Ragnarsson. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Eldonis J. Régulo, La Laguna, Kanariaj In-

suloj. Formato 12 x 18½ cm., broŝurita 119 paĝoj. Prezo f 5,40. Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

La sud-afrikano Edwin de Kock, erudiciulo, instruisto pri la angla kaj afrikansa lingvoj, apartenas al la juna postmilita generacio de poetoj. Lia liriko estas multvaria. En 1961 J. Régulo eldonis lian unuan poemaron *Ombroj de la Kvara Dimensio* (vidu „Nederlanda Esperantisto”, decembro 1961); tiam mi jam atentigis pri tiu juna talento kaj pri lia poezio. Nun, leginte la duan kolekton, mi ankoraŭ pli entuziasmiĝis. Kvankam li ofte ne estas facile komprenebla kaj devigas al plurfoja legado, estas granda ĝuo alproprigi al si liajn pensojn. Bonege li majstras la lingvon, brilas pro inventaj vortkombinoj. Lia religio inspiras lin al demandoj pri la senco de la vivo, lia humileco kondukas lin al verkado pri detaloj en la ĉiutaga vivo, pri la naturo, pri rasismo, ktp. La leganto ekhavas la impreson, ke li verkas tre serioze, ĉizas kaj poluras por prezenti senproĉajn metrikon kaj formon. Tio foje devigas lin al iom torditaj versoj, kiuj bezonas specialan ekzamenadon fare de la leganto.

Komparante ĉi tiun kolekton kun la antaŭa oni notas pli riĉan kaj pli maturan lingvaĵon. Speciale liaj lastjaraj poemoj stampas lin unu el protagonistoj de la moderna postmilita Esperanto-poezio. Scivole oni sekvu la evoluon de tiu talento el la suda hemisfero.

Sekvas la kolekton la daŭrigo de la eseo pri la verstekniko. Al mi ŝajnas, ke li tiusence estas tro rigora, kaj rilate tion mi samopinias kun Ragnarsson, ke la metro plejofte dependas de la deklamanto kaj ke ĝia interrilato kun la senco estas nepretervidebla.

P. M.

NEDERLANDO, nacio en Okcidenta Eŭropo. Eldono de Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, 's-Gravenhage, 1967. 17 x 24 cm., 64 p., broŝurita. Multaj fotoj kaj du koloraj reproduktaĵoj. Prezo: gld. 3,50, mendebla ĉe la sekretariato de nia asocio, s-ino J. C. Heetkamp-Sensius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage, kun samtempa pago al la kasistino. (Vidu „N.E.” de nov. 1967 kaj de jan. 1968).

Jen eldono, kiu jam vekis grandan interreson. La teksto kun la multaj ilustraĵoj donas vastan superrigardon pri ĉiaspecaj

aspektoj de Nederlando. Ĝi certe estas unu el la ĝis nun plej bele ilustritaj eldonoj por informi niajn eksterlandajn amikojn pri nia lando. Leginte ĝin ili komprenos, ke Nederlando ne estas la lando nur de tulipoj, lignaj ŝuoj kaj „Marken kaj Volendam”.

Ankaŭ pri la arta vivo, tiel antikva kiel moderna, ni estas koncize informataj. Du rimarkoj: Jan Luyken certe neniam estis gasto de P. C. Hoofthof en la „Rondo de Muyden”. (p. 22). Tio estas tute nebla, ĉar Hoofthof mortis en 1647, Luyken naskiĝis ne pli frue ol en 1649. H. Kruyden (p. 51) devas esti H. Kruyder.

Entute tre rekomendinda verko, kiun ĉiu el ni povos sendi eksterlanden kiel valoran donacon. Mi ankoraŭ speciale atentigas al la bela frontpaĝa kolorbildo de Amsterdama grafito.

H. G.

VESPERKANTO poemkolekto de Hendrik Adamson. Enkonduko kaj biografio fare de Hilda Drezén. Eldonis J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj. Formato 12 x 18½ cm., broŝurita, 131 paĝoj. Prezo f 5,40. Mendebla ĉe Libro-Servo LEEN, Leeuwarden.

Tiuj apartenantaj al la antaŭmilita generacio de esperantistoj certe sopire memoras pri triopo konsistanta el la estonj Hilda Drezén kaj Hendrik Adamson kaj la latvo Nikolao Kurzens.

Ili ĉiuj grave kontribuis al la alta nivelo de „Literatura Mondo”; Kalocsay en sia en 1934 publikigita verko „Dekdu poetoj” prave eternigis ilin. Ili ĉiuj havis sian personan stilon, sed ĉiu el ili riĉigis la esperantan beletron per pluraj gemoj. Detalojn oni trovas en la impona „Antologio” de W. Auld.

Adamson eble estis pli konata kiel prozisto; la esperantistoj ja pli ŝatas prozon. Liaj noveloj ekz. en la verko „Aŭli” estas ankoraŭ konsiderataj juveloj de la antaŭmilita literaturo.

Kiel poeto el la t.n. klasika periodo li estas certe unu el la plej elstaraj reprezentantoj, kies lingvokono jam tiam montris la direkton en kiun Esperanto poste evoluis. Laŭ lia biografio „sajnis al li ke la sorto ne favoris lin, ke neniam li atingos tion, kion li dezirus”. Tiun animstalon oni renkontas en multaj el liaj versaĵoj, tamen ankaŭ foje trarilablis lian pesimismon iom da optimismo:

*Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo,*

kaj iru dançaŝe sur nia vivvojo ktp.

Lia metriko jam antaŭsignas la modernan poemfaradon kaj estas certe, ke li influis diversajn postvenintajn poetojn. Abundas asonancoj kaj metaforoj, tiel ke multaj versaĵoj estas muzikaĵoj karesantaj la orelojn.

Dum multaj jaroj en lia vivo li kuŝis malsana en lito suferanta pro ftizo. Estas kompreneble, ke tiu sorto influis liajn poemojn:

*„Ronkas malsanaj bronkoj,
ŝvitoplena la lit',
zumas dekmiloj da konkoj -
la sirenoj de l' mit'.*

Estas bedaŭrinde, ke tiu verkisto mortis en 1946, sufiĉe junaĝa. Tial ni gratulas la eldoniston, kiu per bonega kolekto denove metis lin sur la antaŭan scenejon. La indikoj sur la dorsflanko de la kovrilo montras du erarojn (1947 devas esti 1946; 1943 devas esti 1934), dum kelkdetale diversaj versaĵoj ne kongruas kun tiuj aperintaj en la „Antologio”.

P. M.

LA PARTICIPOJ EN ESPERANTO, de G. F. Makkink; 20 paĝa ciklostilita broŝuro, eldonita de la aŭtoro, Eekhoornlaan 10, Wageningen 1967. Prezo: 4 intern. respondkuponoj.

Tiu ĉi, supozeble lasta, eldono pri la participa temo estas speciale rimarkinda pro tio, ke la aŭtoro rigardas la aferon grandparte el alia, ĝis nun preskaŭ tute malatentita vidpunkto: la psikologia. La ĝisnuna diskuta punkto, tempo/aspekto do povis resti ekster konsidero.

Traktinte la Fundamentajn principojn, li konstatas ke ne ĉiuj gramatikaj reguloj estas plene difinitaj, t.e. ili lasas sufiĉan spacon por vasta kompreno. Diferencaj konceptoj do povas, eĉ rajtas ekzisti. En la ata/ita- afero tamen temas pri kontroverso inter regulo de la Fundamento kaj la eksterfundamenta praktika uzado de Zamenhof. Ĉiu necertaĵo en la participa uzado estas solvenda nur laŭ la Fundamento, do ĉio troviĝanta en eksterfundamenta verko, eĉ de Zamenhof mem, ne povas esti rigardata kiel kriterio. Nur tiel ni agas laŭ la spirito de la aŭtoro de Esperanto.

Ĉe ata oni kutime pensas pri ia procezo,

ĉe ita kaj ota pri stato, sed Makkink pruvas per klaraj ekzemploj ke la procezo aŭ stata senco de ata, ita kaj ota ofte dependas de iu komplemento en la frazo; tio implicas ke sen komplemento tiuj sufiksoj povas lasi dubon.

Post konvinka argumentado la aŭtoro konkludas ke por konservi kaj perfektigi Esperanton laŭ la Fundamentaj principoj ni bezonas ortolingvistojn. Tial la tasko de nia Akademio estu ortolingvista, pli ol priskribe lingviva.

Per tiu ĉi broŝuro, objektivaj kaj senpasie verkita, s-ro Makkink faris tre utilan kaj laŭdindan laboron.

G. J. D.

NORDA PRISMO komunikas:

Post la bedaŭrinda morto de nia ĉefredaktoro, d-ro *Ferenc Szilagy*, la provizoran redakton transprenis s-ino *Roza Szilagy*, Döbelngatan 66, Boras, Svedio. Redakcia sekretario estas *M. Groth*, Dröndbyoster torv 6, Hvidovre, Danio. Kiel kunredaktorj daŭre funkcias s-roj B. Ragnarsson, Reykjavik, Islando, J. H. Rosbach, Sarpsborg, Norvegio, V. Setälä, Irislahti, Finnlando kaj P. Thorsen, Kopenhago.

Post necesa reorganizo plej baldaŭ aperos el Danio *Memora numero* pri *Ferenc Szilagy*. Kun la numero estos la oficiala dana publikaĵo *Danio en bildoj*. Neabonantoj povas mendii per alsendo de 5 int. resp. kuponoj aŭ 7 steloj = gld. 1,75 ĉe la administranto, E. J. Frost, Ved Fortunen 16, Lyngby, Danio, ĝirkonto 9 05 55.

Centjaro de Wladyslaw Reymont

Oni celebris en 1967 la centjaran datrevenon de la naskiĝo de unu el la plej grandaj polaj verkistoj, Wladyslaw Reymont (1867-1925), kiu en 1924 ricevis la Nobel-premion por literaturo. Liaj plej gravaj verkoj estis romanoj: „La aktoriĉo”, „La lando promesita”, „La jaro 1794” kaj lia ĉefverko „La kamparanoj”. En Esperanta traduko aperis pluraj noveloj kaj rakontoj de Reymont: „Ave Patria, morituri te salutant” (tr. Leono Zamenhof), „La lasta” kaj „En fumejo de l'opio (ambaŭ tr. Kabe) kaj „El la konstituciaj tagoj”. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

FINKONKLUDOJ PRI LA ATA/ITA-DISKUTADO

(*Vidu sub: „ASOCIAJ INFORMOJ”, p. 10 de tiu ĉi numero*)

Jam tro longe tiu ĉi diskutado, kiu kelkfoje eĉ degeneris al disputado, okupis la pensojn de esperantistaj lingvistoj. Kiu deziras ankoraŭ profundigi en la aferon, trastudu la verkojn „Simpozio” kaj „Vojaĝo inter la tempoj” pri la itismo, „Esperanto - moderna lingvo” kaj „Ĉiuj formoj de la pasivo” pri la atismo, kaj „La Esperanta konjugacio” kiel provon de kompromiso inter ambaŭ konceptoj*. Mi konjektas ke multaj interesiĝantoj venos al la samaj konkludoj kiel mi: unue kaj plej grave, ke multo da tempo kaj mono estas uzita por senfrukta afero anstataŭ por la intereso de nia movado mem.

Sed ankaŭ aliajn konkludojn oni povas ĉerpi el la diskutado. Jen ekzemple la teorio pri la aspektoj (eble pli taŭgas por tiu nocio la termino „agokarakteroj” el la germana lingvo), pri kiu la granda plimulto de la esperantistaro neniam aŭdis, nek legis. Tiuj aspektoj nekontesteble ludas gravan rolon en la konjugacio de ĉiuj kulturaj lingvoj, inkluzive en Esper-

Kiu povas informi nin?

En laŭ mia supozo la tridekaj jaroj aperis ĉe la Presejo „Helmond”, Esperanto-Fako (HELMOND, Nederlando) la serio „Ideala Esperanto-Biblioteko”. Kelkaj verkoj el tiu serio estas ankoraŭ haveblaj (vidu „Jarlibro” de UEA, 1967, p. 480).

Mi konas 5 titolojn:

1. Blua sango, de Willy Wood, trad. de Willy van Zoest.
2. La Morea perlo, de D. Simson, trad. de R. Delpasko.
3. Irisis, de H. t Sas, trad. de P. Ch. M. v.d. Vijver.
4. Sub la vitra kupolo, de V. L. van Weddingen, trad. de M. Groels.
5. La radiantanta lotuso, de J. D. Degreef, trad. de P. van de Vijver.

Ĉu aperis pli?

Kurioze estas, ke en la anonco sur la lasta paĝo de „La Morea perlo” kiel verkinto de „Irisis” estas menciita Willy Wood. En la aperinta verko tamen oni

anto. Al multaj radikoj unu aŭ alia aspekto estas inherenta. Aspektojn indikas ankaŭ kelkaj afiksoj (ek, re, ad, for, el). Pri tio certe samopinias ĉiuj diskutintoj. Sed pri kio ili ne samopinias, tio estas ke ankaŭ la participaj sufiksoj povas indiki aspekton. Mia persona opinio troviĝas meze inter ambaŭ partioj. Por mi la aktivaj participoj esprimas krom tempoj ankaŭ aspektojn: ont la instantivon, ant la progresivon, int la perfektivon. La pasivaj participoj plenumas duoblan rolon: ili estas aŭ la pasivoj de la simplaj verboformoj os, as, is, aŭ la pasivoj de ont, ant, int. En la unua kazo la aspekta nocio mankas; en la dua kazo mi vidas en ot, at, it aspektojn, same kiel en ont, ant, int. Tiu ĉi dusenceco rezultas el la fakto ke mankas en nia konjugacia sistemo simplaj pasivoj. Kaj ĝuste tiu ĉi dusenceco estu por ni motivo por tre ŝpare uzi la malsimplajn pasivajn formojn. Anstataŭe oni prefere uzu aktivon aŭ medialon (iĝi). Krom tio nenecesa uzo de pasivo sonas malbele (estas sciigite, oni estas petata, estas sciate; la lasta estas eĉ de Kalocsay mem!).

Ĉar Zamenhof parolis nur pri tempoj, neniam pri aspektoj, ni ne rajtas aliama-
(*daŭriĝo sur p. 18*)

mencias kiel verkinton H. t Sas. Tio plifortigas nian supozon, ke almenaŭ kelkaj aŭtoroj estas pseŭdonimoj(?) de unu sama persono. Verŝajne ankaŭ la nomoj de la tradukintoj estas pseŭdonimoj. S-ro Degenkamp skribis al mi: „Mi legis la librojn jam antaŭ pluraj jaroj, sed memoras ke la stilo de kelkaj el ili estis tia, ke oni tuj konjektas ke unu sama persono estas la tradukinto”. Neniu el la menciitaj nomoj, ĉu de verkintoj, ĉu de tradukintoj, estas laŭ mia scio konata el la historio de la Esperantomovado en nia lando. Oni eĉ povus supozi, ke ĉiuj romanetoj estas originale verkita en Esperanto de la sama persono.

Kvankam la verkoj tute ne estas altvaloraĵoj, tamen estus interese scii kiu(j) estas la aŭtoro(j), resp. la tradukinto(j). Kiu povas informi nin? Informpetoj ĉe la eldonejo restis sensukcesaj.

Ĉiun informon ni volonte ricevos, kaj se oni permesos tion, publikigos en „N.E.”.

H. Groendijk.

niere klarigi liajn regulojn pri la partecipoj krom kun temposignifoj. Akceptante tion, ni povas veni al la konkludo ke la pasivaj partecipoj el si mem havas temporan signifon, sed en kazoj en kiuj ili indikas pasivon de ont, ant, int ili *krome* povas enhavi aspektan sencan. Aliavorte: en la partecipoj do povas esprimiĝi du nocioj: tempa kaj aspekta, sed en kiuj povus estiĝi miskompreno, validas nur la laŭregula tempa signifo.

Ni ne povas ne konstati ke ekzistas ia kontraŭeco inter la Zamenhofa regulo pri tempoj, kaj lia evidenta prefero por ita, kion lastan la itistoj utiligas por sia aspekta teorio. Siaflanke la atistoj sukcesis klarigi la plej multajn Zamenhofajn formojn ankaŭ laŭ tempa vidpunkto, do konforme al la Zamenhofa regulo. (Vidu „La Esperanta konjugacio” de Jung). Kaj ĉar tiu fakto favoras la atisman teorion, tiu teorio ŝajnas al mi pli akceptinda ol la itisma.

Dume la diskutoj kaj polemikoj ne kondukis al kontentiga solvo. Eĉ la kompromiso de Jung oni ne tiom favore akceptis kiel ni esperis.

Tial, surbaze de la kompromisa ideo, mi proponas ke oni tute ĉesigu la diskutojn kaj silente interkonsentu, ke ĉiu partio uzu siajn preferatajn formojn kaj - kio estas la plej grava - praktiku plejblan toleremon koncerne la preferatajn formojn de la alia partio. Nur tiel agante ni revenos al lingve kaj stile normala situacio. Ni atentu ke sur lingva tereno dezirindas ia libereco por esprimi personajn sentojn kaj gustojn. De itisma flanko oni atentigas pri opinidiferencoj inter atistoj. Sed siaflanke la nun propagandata itismo en pli ol unu punkto diferencas de la Zamenhofa lingvouzado. (Pensu pri la „modela frazo” de Waringhien, kiun Jung citas en sia libro, kaj en kiu ita havas sencan rekte kontraŭan al la senco de ĉiuj adekvataj Zamenhofaj relativaj propozicioj). Cetere, estus ja kontraŭnature postuli ke aliaj pensu same kiel ni! Lingvistiko ne estas ekzakta scienco kiel matematiko! Oni ne skermu per la vorto „unueco”! Ekzistas ankaŭ ia unueco el kontraŭaĵoj, aliavorte: harmonio. Oni ja ankaŭ ne rajtas postuli ke ĉiu uzu unu saman stilon!

Fine, la diskutoj tiom akre koncentriĝis ĉirkaŭ la afero ata/ita, ke oni malatentis la ekziston de pluraj aliaj lingvaj formoj eĉ pli diskutindaj. Al tiuj temoj oni de-

diĉu sian atenton, sed en atmosfero harmonia, sen altrudo aŭ persvadoj. Lingvo estas ja grandparte afero de sentoj, iom komparebla kun religio kaj politiko, kaj ankaŭ sur tiuj terenoj oni neniam atingas harmonion per persvadoj. Ni lernu esti toleremaj respektante aliiies opiniojn. Ni ĉesu esplori ĉu haro estas unu-aŭ-dufoje fendebila! Klopodante „serĉi por ĉiu solvo problemon”, ni faras nin rindindaj. Mi do esperas ke la ata/ita-afero nun efektive estas finita.

G. J. Degenkamp.

* **Literaturo pri la temo ata/ita, laŭ jaro de apero.**

- 1960: La kunmetitaj verboformoj - pri la absurda ata/ita-problemo, Teo Jung. Eld.: Heroldo de Esperanto Harstenhoekweg 223, Scheveningen. 55 pĝ.¹⁾
- 1961: La Zamenhofa Esperanto - simpozio pri ata/ita, 11 diversnaciaj aŭtoroj (De Hoog, Gregor, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Pumpr, Régulo, Schwartz, Sonnenfeld, Waringhien). Eld.: Stafeto, La Laguna, Kanariaj insuloj, Hispanujo. 332 pĝ., f 11,—²⁾.
- 1964: Ne kiel Meier - invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio de Esperanto, R. Schwartz. Eld.: U.E.F., Rue de Chabrol 34, Paris (10). 48 pĝ., f 1,50²⁾.
- 1965: Esperanto - moderna lingvo, Setälä, Vilborg, Stöp-Bowitz. Eld.: Fondumo Esperanto, Helsinki. 136 pĝ., f 3,75¹⁾.
- 1966: La Esperanta konjugacio, Teo Jung. Eld.: H. de E., Harstenhoekweg 223, Scheveningen. Du volumoj, 245 pĝ., kune f 13,50¹⁾.
- 1967: Vojaĝo inter la tempoj, K. Kalocsay. Eld.: Stafeto, La Laguna, Kan. ins., Hispanujo. 200 pĝ., f 8,75²⁾.
- 1967: Ĉiuj formoj de la pasivo . . . , H. Friess. Propra eldono, Sudentenstr. 6, 6407 - Schlitz, Germana Fed. Resp. 15 pĝ., f 0,75¹⁾.
- 1967: La partecipoj en Esperanto, G. F. Makkink. Propra eldono, Eekhoornlaan 10, Wageningen, Nederlando. 20 pĝ., 4 int. rpk.

¹⁾ Pledas por ata.

²⁾ Pledas por ita.

**ĜENERALA NEDERLANDA
ESPERANTO-EKZAMENO-KOMITATO**

Amsterdam, 16 decembro 1967.
S. 1. Traduku 2 h.

La lingvistika valoro de la akuzativo.

La akuzativon Zamenhof verŝajne enkondukis en la lingvon por doni al ĝi pli grandan klarecon, flekseblecon kaj unuformecon. Sed tuj de la komenco, li volis plene eluzi la oportunecon de tiu gramatika ilo, kaj ne limigis ĝian rolon al tiu de esprimilo de la rekta objekto; li asignis al ĝi du aliajn gravajn rolojn: unue montri la direkton - kaj tiele ŝpari duoblan serion da prepozicioj por la signifo de celo kaj por tiu de pozicio; due anstataŭi ĉian alian prepozicion - kaj tiele eviti la malfacilan elektadon ĉe dubaj okazoj. Se por la dua el tiuj funkcioj li trovis multajn precedencojn en la naturaj lingvoj, la tria estis pure lia elpensajo, ĉe kiu li unu fojon plie pruvis sian lingvan genion (same kiel la kreado de la prepozicio je). La akuzativo tiel fariĝis ne simple unu el la diversaj elementoj de la morfologio, sed ja ĉefa kaj esenca subtenilo de la tuta esperanta sintakso, kaj eble ĝia karakteriza trajto. En nenia alia lingvo, tiu kazo ludas analogan kaj egale gravan rolon. Tiom ke, se oni konsideros la esperantan sintakson tute sendepende de la gramatika tradicio de la okcident-eŭropaj lingvoj, oni devus paroli ne pri ia akuzativokazo, kiu ligiĝas kun certaj difinitaj gramatikaj funkcioj, kaj kontrastas kun unu aŭ pluraj paralelaj kazoj - sed ja pri ia signo de komplemento, ia n-finaĵo, uzota ĉe ĉiu vorto (ekster kompreneble la subjekto kaj la predikativo), kiu ne estas signita per prepozicio, kia ajn estas la gramatika rolo de tiu vorto.

En Esperanto, la kontrasto ne estas inter unu nominativo, unu akuzativo aŭ iu genitivo, ekz-e, sed inter la subjekto (kaj la vorto, kiun oni identigas al tiu, t.e. la predikativo) kaj la komplementoj, el kiuj ĉiu devas esti montrata de fonetika signalo, aŭ de prepozicio antaŭ ĝi, aŭ de n-finaĵo post ĝi.

El: G. Waringhien: Lingvo kaj Vivo. paĝo 161a.

S. 2. Traduku (2 h.)

In de crisisjaren tussen de beide wereldoorlogen was het vinden van arbeids-

krachten geen probleem. Duizenden hunkerden naar een baan. Men zocht de bruikbare mensen uit. Als iemand niet voldeed, nam men terstond een ander. Waarom zou men geld uitgeven om de werknemers zo rendabel mogelijk te maken? De keus was groot en de lonen waren laag. Een kleiner aantal beschikbare werkkrachten dwingt de industrie tot een voorzichtiger politiek. De produktiviteit van de mensen moet men zo groot mogelijk maken.

Scholing is het meest voor de hand liggende middel. Toch is het bijbrengen van vakkennis alleen niet voldoende. Er ligt zelfs een gevaar in: scholing maakt de man aantrekkelijker voor een ander bedrijf. Men moet hem dus op de een of andere wijze zien te binden. Hoe? Men zal er naar streven te maken dat hij zich thuis voelt in zijn omgeving, dat hij belangstelling heeft voor zijn taak in het bedrijf en dat hij het gevoel heeft een nuttig lid te zijn van de gemeenschap waartoe hij behoort.

Het merkwaardige is dat industrieel onderwijs, althans voor een gedeelte, deze wensen kan verwezenlijken. Onderwijs is namelijk nooit uitsluitend overdracht van kennis. Wie iets heeft geleerd is niet meer dezelfde. Onderwijs en opvoeding zijn niet te scheiden begrippen. Voor beide geldt, dat men er nauwelijks te vroeg mee kan beginnen.

Vrijwel altijd is de overgang van schoolbank naar arbeidsproces een overrompeling: de onoverzichtelijke veelheid van indrukken werkt verwarrend op de nieuwkomer. Het is voor het bedrijf van essentieel belang deze overgang zo weinig mogelijk schokkend te doen verlopen. Men zie dit niet als een moderne verwekelijking: vroeger was de aard van een bedroef (hoefsmederij, leerlooierij) duidelijk genoeg voor een leek. In een moderne fabriek ziet een bezoeker nauwelijks wat men maakt en hoe men het doet. De nieuwkomer heeft voorlichting nodig.

PBNA: Scholing zonder school, p. 11.

S 3.

Vi disponas pri dek minutoj por prepari vin por la sekvantaj temoj:

- donu klarigon pri la epiteto kaj predikative uzitaj adjektivoj.
- pritraktu la komparacion.

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Aganta prez.: Sro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Sensius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE

Konferenco pri dulingvismo en Kanado.

En la plimulto da landoj de la mondo estas pli ol unu vaste uzata lingvo. Malgraŭ tio, la pli grandan parton da laboro pri dulingvismo faris unuopaj sciencistoj, izolite, sen internacia komparo.

Konsidere al tio, la organiza komitato de la Internacia Seminario pri Dulingvismo, kiu okazis antaŭnelonge en Moncton, New Brunswick, sub aŭspicio de la Kanada Nacia Komisiono por Unesko, decidis, ke plej valora estus studo interfaka kaj internacia. Tial troviĝis inter la 90 personoj el 18 landoj, kiuj partoprenis, lingvistoj, psikologoj, sociologoj, demografoj kaj aliaj fakuloj. La ses ĉefaj studoj komisiitaj por la Seminario kaj la koncernaj diskutoj aperos en plena raporto post nelonge. (Laŭ Unesco Featureres kaj Informa Servo de UEA).

Muzeo Ciolkovskij

En Kaluga, Soveta Unio, oni antaŭ nelonge inaŭguris kosmonaŭtikan muzeon nomitan memore al unu el la pioniroj de kosmonaŭtiko. Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857-1935). La inaŭguro koincidis kun la 10-jara datreveno de la lanĉo de la unua artefarita satelito. La muzeo enhavas grandan kolekton da objektoj rilataj al kosmonaŭtiko, aviado kaj raketa tekniko, i.a. la unuaj sovetaj ek-

sperimentaj raketoj lanĉitaj en 1933, la sputnikoj kaj lunikoj, la aŭtomata interplaneda stacio Venera kaj la kosmoŝipo Vostok, en kiu Gagarin unuafoje veturis en la kosmon, en aprilo 1961. La muzeo posedas ankaŭ elektronan „Informan Servon”, kiu kapablas respondi 800 demandojn pri la kosmo.

K. E. Ciolkovskij estis konata ankaŭ pro sia interesiĝo pri la lingva problemo. En 1934 li membriĝis al Sovetrespublikara Esperantista Unio. (Laŭ Unesco Featureres kaj Informa Servo de UEA).

Mongola Kulturo

La Seminario pri Lingvo- kaj Kulturscienco de Centra Azio en la Universitato de Bonn (G. F. R.), la sola tiaspeca en okcidenta Eŭropo, lastatempe aperigis la 17-an volumon de la serio „Aziaj Esploroj”: *Collectanea Mongolica*. La verko, en kiu kunlaboris okcidentaj kaj orienteŭropaj mongolistoj, estas dediĉita al Prof. B. Rinĉen, la eminenta mongola folkloristo (ankaŭ gvidanto de la Esperanto-movado sialanda), kiu fariĝis 60-jara.

(laŭ „Okcidentgermana Revuo” de nov.-dec. 1967.

Itala fervoja horaro ankaŭ en Esperanto

La horaroj de la Italaj Fervojoj ekde la venonta somero estos presitaj en multaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto. La ĝeneralaj informoj kaj klarigoj jam aperas en itala, angla, franca, germana kaj hispana lingvoj.

La somera horaro 1968 estos la unua ŝtata dokumento, kiu aperos en Esperanto.

(laŭ „Algemeen Dagblad” de 13-12-67).

Klarigo:

Vi devas pritrakti kun lernantoj la de vi elektitan temon.

Zorgu do pri ekzemploj, kaj komencu simple.

